En Dijon, la 6/II 1903

R. Japiot
18, Rue Chabot-Charny
Dijon
France

Estimata Sinjoro!

mi esperas ke vi volos senkulpigi min skribantan al vi kvankam mi ne havas la honoron ekkoni vin, kaj eĉ sendi al min la informon kiun mi volas peti de vi.

Ĉar la lingvo internacia „Esperanto" ne estas bedaŭrinde konata de ĉiuj, kaj precipe en via Lando, tamen tute simila nun al la landoj de Europa civilizacio, mi volus iomete informiĝi pri la lingvoj per kiuj oni povas sin komprenigi en Japanujo.

Efektive mi havas unu parencon, kiu estas inĝeniero, kaj kiu, pli aŭ malpli frue, faros longajn vojaĝadojn tra la Azio kaj la Ameriko. Li nur scias la francan kaj la germanan lingvon, kaj lernadas la anglan. Pro tiu ĉi kaŭzo mi estus do tre danka al vi se vi informus min ĉu tio sufiĉos al li por kompreniĝi en la plej multaj Japanaj urboj. Eĉ, ĉu la franca lingvo estas pli malpli konata de viaj samlandanoj?

Mi esperas ke vi ne rifuzos respondi almenaŭ unuvorte mian demandon, kaj mi havos al vi pro tio grandan dankecon. Mi ankaŭ estus feliĉa se mi povus servi vin iamaniere ajn; vi nur bezonus diri kiel mi povus esti agrabla al vi.

Kaj atendante mi petas vin akcepti l'esprimon de miaj respektoplenaj sentoj

R. Japiot

Monsieur Hasegava

Professeur

à l'École supérieure des langues étrangères

Japon Tokyo


LIGNE N
8 FEVR 03
PAQ. FR. No 6
ETRANGER
7-2 03
特別
イ 4
2090
58 (15)